



An organ of the Esperanto Association of Britain

Organo de Esperanto-Asocio de Britio

No. 42, July–September 2008 ★ N-ro 42, julio–septembro 2008

ISSN 1741-4679

International communication without discrimination ★ Respect for all cultures
Internacia komunikado sen diskriminacio ★ Respekto por ĉiuj kulturoj

Impresoj el la Brita Kongreso de Esperanto 2008

La bela marborda urbo Southport gastigis la 89-an Britan Kongreson de Esperanto de la 9-a ĝis la 11-a de majo. La urbo mem sendube estis agrabla loko por kongresi. Ĝi fieras pri sia longa kaj larĝa Viktoriana bulvardo kun feraj verandoj laŭ sia longo. La urbo ekestiĝis en tiu epoko, kaj oni prave provas pluteni la originalan karakteron.

Ne sole Southport estis bonveniga por ni, sed ankaŭ la vetero. La suno emis brili eĉ foje

varme, kvankam malvarma vento ne ĉiam forestis.

La kunvenejo

La kongresejo estis du teretaĝaj ĉambroj en Hotelo Prince of Wales, solide granda Viktoriana konstruaĵo kun ĝardeno ĉe la ĉefstrato. Granda banderolo kun la vortoj 'Esperanto-konferenco' super la ĉefpordo anoncis nian ĉeeston.

Partoprenis eble ĝis sesdeko da esperantistoj, inkluzive de
Daŭrigo sur la sekva paĝo

- **The Polish Parliament passes unanimous resolution praising 100 years of the World Esperanto Association (UEA)**

(see page 5)

- **€55,000 EU grant for European Esperanto Union**

(see page 16)



Joyce Bunting (staras), Stephen Thompson, Clare Hunter, John Wells kaj Jack Warren (de maldekstre) preparas sin antaŭ festkuko.

kelkaj eksterlandanoj, eĉ el Nov-Zelando.

JEB (Junularo Esperantista Brita) estis tre bonvena ĉe la kongreso en Southport. Pluraj gejunuloj partoprenis en kunsido de JEB dimanĉon posttagmeze. Ni nepre kunestu, almenaŭ unufoje jare.

Malfermo

La Solena Malfermo de la kongreso montriĝis aparte bone aranĝita. Malfermis la kongreson la Urbestro de Sefton, Richard Hands, akompanata de la Urbestrino, kiu estas lia filino. Parolis ankaŭ la loka partamentano John Pugh, MP, kaj la 'Alta Protektanto' de la kongreso Lordo Ronnie Fern, OBE. Ĉiu

alparolis la kongreson. Baldaŭ montriĝis, ke ili ne sole pro afableco elparolis kelkajn vortojn de Esperanto, sed ili ĉiuj montris veran intereson pri la afero kaj restis por interparoli, kio prokrastis la postan programeron. Ja pri tio oni ne plendas.

La LKK meritas apartan dankon pro siaj ĉi-rilataj lertaj klopodoj, kiuj rezultis je multe pli ol la kutimaj ŝablonaĵoj de invititoj.

Programeroj

Vendredon Paul Gubbins bonvenigis la partoprenantojn per interesa, 'neformala' prelego pri la historio de sia naskiĝurbo Southport. Vespere li refoje

Daŭrigo sur la kontraŭa paĝo

Fulmotondro!

Jes, efektive, fulmo trafis la redaktan komputilon frue en majo, kio prokrastis ĉion je unu semajno. Kaj – kiel la ĉie konata s-ro Murphy aranĝas tiajn aferojn – tio okazis precize semajnon antaŭ ol venis rezervita liber-tempo – do sume du semajnoj da prokrasto!

Krom laŭokaza fulmotondro, okazas tiom da aferoj kaj aranĝoj en la Esperanta mondo. Pri nur iom de ili vi trovos informojn en ĉi tiu bulteno. Eble ni aparte gratulu Eŭropan Esperanto-Union pro la gajno de 55-mil eŭra subvencio de EU. EAB jam de pluraj jaroj signife subtenas Eŭropan Esperanto-Union, kiu antaŭ kelkaj jaroj bedaŭrinde devis ĉesi havi dungiton pro rimedomanko.

Al 'Tales from the Country' (paĝoj 8–9), aldoneblas, ke kolemino de mia edzino hazarde vidis tiun televidan programon kaj ŝi, neniam aŭdinte pri Esperanto, montriĝis favore impresita.

Geoffrey Sutton



Fotiĝas en gaja etoso post la Solena Malfermo (de maldekstre) Lia Urbeŝtra Moŝto de Sefton, Prezidanto de EAB Prof. John Wells, la Urbeŝtrino kaj parlamentano John Pugh, MP.

- Material for the next issue of *EAB Update* should be with the editor no later than 25 August.
- Materialo por la venonta numero de *EAB-Ĝisdate* atingi la redaktoron plej laste la 25-an de aŭgusto.

EAB-Update / *Ĝisdate* is a quarterly organ of the Esperanto Association of Britain / estas kvaronjara organo de Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House / Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE.

Tel. 0845 230 1887 or +44 (0)1782 372141

Fax / fakse: on request / laŭpete

E-mail / rete: eab@esperanto-gb.org

Websites / ttt-paĝaroj: www.esperanto-gb.org
www.esperantoeducation.com

□ Membership of EAB costs £25 a year (£20 concession); supporter or youth member £10 / Membrigi en EAB kostas £25 pundojn jare (£20 rabatite); subtenanto aŭ juna membro pagas £10 pundojn.

☆

□ Material for *Update* should be sent by e-mail, computer disk (rtf format, please) or hard copy direct to the editor / Materialon por *Ĝisdate* oni sendu rete (formaton rtf, mi petas), diske aŭ papere rekte al la redaktoro: Geoffrey Sutton, 7 Clover Road, Aylsham, Norwich NR11 6JW; e-mail / rete: gsutton@computekmail.co.uk. Material may be in Esperanto, English, Welsh or Gaelic / Materialo rajtas esti en la lingvoj internacia, angla, kimra aŭ gaela.

□ EAB also publishes the review *La Brita Esperantisto*, wholly in Esperanto / EAB eldonas ankaŭ la revuon *La Brita Esperantisto*, tute en Esperanto.

☆

□ EAB is a registered charity (No. 272676) and an affiliated national association of the Universal Esperanto Association, which has official relations with the United Nations and Unesco / EAB estas leĝe registrita bonfara asocio kaj aliĝinta landa asocio de Universala Esperanto-Asocio (*Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 Rotterdam, Nederlando. Tel. 00 31 10 436 1044; fax / fakse: 00 31 436 1751; e-mail / rete: uea@uea.org; www.uea.org*), kiu havas oficialajn rilatojn kun Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesco.

☆

□ EAB is also affiliated to the International League of Esperanto Teachers and the European Esperanto Union / EAB aliĝis ankaŭ al Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kaj Eŭropa Esperanto-Unio (EEU).

☆

□ The views expressed in *EAB Update* are not necessarily those of the Management Committee of EAB / La opinioj esprimataj en *EAB-Ĝisdate* ne nepre estas tiuj de la Administra Komitato de EAB.



Clare Hunter preparas sin por tranĉi la festokukon de la jubileantaj Nord-okcidenta kaj Jorkŝira Esperanto-Federacioj, kaj (sube) John Pugh, MP, alparolas la kongresanaron ĉe la Solena Malfermo.



amuzis nin ĉe la Interkona Vespero per kvizo.

La sekvan tagon Roman Dobrzyński el Pollando, la honora gasto, prelegis pri la Esperanta infanvilaĝo Bona Espero en Brazilo. Li montris por ni du interesajn filmojn pri Bona Espero, kiujn li faris por la Pola Televido. Ili kompreneble havis Esperantan parolon. Estis interese unuafoje vidi kvazaŭ vive kiel aspektas Bona Espero. Ĝia ĉefa celo estas doni al infanoj, ofte orfoj, kiuj alikaze kredeble perdiĝus en la plej profundan mizeron, eblecon je normala vivo. Jen bona kialo por vojaĝi al la interno de triamonda lando, por tie sperti ne sole tieajn kondiĉojn, sed eventuale praktike helpi ankaŭ per Esperanta interparolo de eksterlandano.

Poste Roman prelegis pri 'Esperanto – la pontolingvo de mia profesio'.

Komencantoj povis partopreni en konversaciaj rondoj, kiuj estis gvidataj de Malcolm Jones, Joyce Bunting, Anica kaj Terry Page, kaj David Kelso.

Estis bedaŭrinde, ke Angela Tellier lastmomente devis malmendi sian partoprenon pro familia malsano. En ŝia loko prelegis David Kelso pri la projekto Lingvolanĉilo.

John Wells prelegis pri la Liverpola prononco en la serio Buchanan de Universitato de Liverpolo.

Geoffrey Sutton prezentis sian baldaŭ aperontan anglalingvan verkegon *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto 1887–2007* (vidu la lastan paĝon).

Kompreneble okazis ankaŭ distraj programeroj. Inter ili okazis ankaŭ 'Dezertinsulaj diskoj', en kiu Stephen Thompson intervjuis al Sally Phillips. Aŭskultintoj nomis ĝin 'foje kortuŝa' kaj 'bone planita'. Pli frue Stephen, Hilary



La kongresanaro atendas babilante.

Chapman kaj Jack Warren prezentis prelegon pri Esperanto-kanzonoj, kaj ne forgesis kantigi la ĉeestantaron.

Libroendado

Libroservo funkciis dum granda parto de la tempo. Ĝiaj organizintoj meritas apartan dankon pro la peza laboro.

Du centjariĝoj

Du federacioj solenis ĉiu sian centjariĝon dum la kongreso – la nordokcidenta kaj la jorkŝira. Parolis Joyce Bunting, kaj poste Stephen Thompson kaj Jack Warren prezentis ĉiu sian federacion. Grandan kukon oni farigis (vidu la bildon sur la antaŭa paĝo). Ĝi sukere surportis blankan kaj ruĝan rozajn kaj kompreneble verdan stelon, el kiu profitis la tuta kongresanaro kun glaso da io bona. Clare Hunter distranĉis por ni la festkukegon.

Jarkunveno

La Jarkunveno de EAB iris tiel glate kiel dum la pasintaj kelkaj jaroj. Skrupule kaj eble iom tro tolereme prezidis ĝin John Wells, kiu meritas apartan dankon. La membraro refoje elmontris sian fidon al la komitato per ĝia reelekto. Derek Tatton tamen

jam pli frue demisiis pro troa okupiteco. Liaj scioj pri la funkciado de aliaj similaj organizaĵoj kaj aparte pri la estrado de Wedgwood Memorial College estis aparte valoraj al la Administra Komitato.

Informado

Aperis elstara artikoleto kun la titolo 'Bonvenon al Southport' en n-ro 8 de *Southport Conference Times*, verkita de Jim Voiels. Pliaj mencioj kaj artikoloj aperis en la

loka ĵurnalo *Champion* la 30-an de aprilo kaj la 7-an de majo. Ĉi tiu, verkita de ĵurnalisto Andrew Ashcroft, portis la titolon 'The language Hitler tried to kill'. *Liverpool Echo* aperigis mallongan atentigon pri la kongreso la 1-an de majo. Simila peco aperis en *Southport Visitor* la 9-an, kun krome du artikoletoj papere plus unu en sia retpaĝaro.

Ankaŭ la radio informis pri Esperanto. BBC Radio Merseyside intervjuis al Ian Mac Dowall kaj Roman Dobrzyński en sia 'matenmanĝa prezento' la 9-an de majo. La postan tagon Dune FM intervjuis Paŭlon Gubbins pri la kongreso. Ĉi tiu stacio faris ankaŭ pliajn menciojn.

Gratulojn al Jim kaj la cetera LKK pro tiuj trafoj.

En Southport okazis samtempe kongreso de kristanaj virinoj. Elizabeth Stanley meminciate iris tien kaj transdonis salutojn de



Plej supre: David Kelso prezentas la plej lastan staton de Lingvolanĉilo. Meze: Roman Dobrzyński prelegas, dum maldekstre sidas Paul Gubbins. Dekstre: John Wells prelegas pri la Liverpola Prononco.



Roman Dobrzyński

esperantistoj, tiel ke ankaŭ ĉiuj partoprenantoj de tiu kongreso aŭdis pri Esperanto.

Dum nia kongreso Stephen Thompson prezidis kunsidon pri progresigo de la publica laboro de EAB. Ni ĉiuj kompreneble avide atendas konkretajn rezultojn sur tiu gravega kampo.

Dankon!

La lokaj, kaj ne tiel lokaj, organizintoj – Peeter Aitai, Ian

Polish Parliament unanimously praises the World Esperanto Association

The Polish Parliament has honoured the centenary of the founding of the World Esperanto Association (UEA) by unanimously accepting a resolution by 397 votes. Part of the resolution reads: 'Esperanto puts people in communication in a rich and valuable culture whose fundamental message is international friendship and universal peace.'

The resolution also states that Dr. L.L. Zamenhof 'in initiating the language Esperanto wished to assure that everybody had the possibility of mutual understanding, without regard to nationality, race, religion or personal world-views.' Also:

The Polish Parliament, wishing to honour the contribution of Dr. L.L. Zamenhof to world civilisation supports the efforts of international circles to honour UEA with the Nobel Peace Prize.

If you are not already a full member of UEA, don't forget to join next year!

La voĉoj de la membraro estis jenaj:

	Por	Kontraŭ	Sindeteno
David Bisset	69	5	4
Jean Bisset	69	5	4
Joyce Bunting	76	1	1
Edmund Grimley Evans	71	1	6
David Kelso	73	3	2
John Wells (prezidanto)	75	1	2

el la plej belaj en la lando.

La venonta BK en Salisbury

La venonta Brita Kongreso okazos de la 17-a ĝis la 19-a de aprilo en Salisbury. Espereble iom pli da homoj partoprenos. Memoru, ke ĝi estas via kongreso – ĉiu estas bonvena.

GS

Mac Dowall, Paul Gubbins, Vivienne Isherwood, Brendan Marsh, Richard Phoenix, Jim Voiels kaj Andrew Wheatley – meritas nian elkoran dankon pro siaj bonaj kaj sukcesaj laboroj. Administre subtenis la kongreson ankaŭ la oficeja laboro de Viv O'Dunne en Barlastono. Mi estas tute certa, ke la plimulto de la partoprenintoj ĝuis preskaŭ ĉiun kunvenon. Espereble venontaj organizantoj de britaj kongresoj aranĝos komunan bankedon. Oni sentis ĝian mankon, kaj gravas ĝia solidariga efiko, kvankam tia kunmanĝado postulas ne malmulte da organizado. Eble oni transdonu la organizan zorgon al la elektita restoracio. En Southport tamen neniel mankis proksimaj manĝejoj laŭ la apuda ĉefstrato, reputacie unu

Gift Aid

giftaid it

EAB has just claimed £2,365.98 from Gift Aid subscribers in the year up to 5 April 2008. Two substantial (anonymous) donations boosted the total. Our thanks go to everyone who signed up.

You have to be a tax payer. This could mean tax paid directly, or at source on a bank or Building Society investment account, pension, income from investments etc. If you would like EAB to recover tax on your subs and donations (not purchases) you can do it by telephone to the office: 0845 230 1887

Income Tax will be reduced from 22% to 20% for the tax year starting 6th April 2008. That should mean the proportion reclaimable by charities would reduce also, but HMRC has agreed to allow interim claims @ 22% for the next couple of years. So the value of Gift Aid will not reduce yet. It means £25 becomes worth £32.

A further change is that future reclaims will be made in line with the charity's financial year. The total above represents £1,289.82 claimed up to 31 October 2007 (EAB's financial year end) plus a further £1,076.16 from 1 November 2007 to 5 April 2008.

Joyce Bunting,
Honorary Treasurer

Ripozi majstre – kuracumi sin sam- loke kiel Zamenhof

Jen artikolo de pola ĵurnalisto kaj filmisto Roman Dobrzyński, kiu ĉi-jare estis honora gasto ĉe la Brita Kongreso de Esperanto en Southport. Ŝajnas, ke Ludoviko Zamenhof kuracis sin plej trankvile kaj efike en la jaro 1912 dum sia estado en Bad Salzbrunn, Germanio. Nun la kuracloko nomiĝas Szczawno Zdrój, ĝi troviĝas en Pollando kaj samamike ofertas ripozon al ĉiuj esperantistoj.

Interreta atingo ĉe Google

Lastatempe okazis gravega atingo de Esperanto sur la kampo de la interreto. Eble vi ne scias, ke en interretaj serĉiloj kiel Google kaj Yahoo oni uzis la vortojn 'kaj estas', eventuale 'kaj la estas', kiel aldonon al la efektive serĉata esprimo, por elfiltri el la tuta reto nur la Esperantlingvajn paĝojn kaj en tiuj serĉi. Tiu solvo funkciis relative kontentige.

Ekde kelkaj monatoj tamen, tiaj vortoj ne plu estas necesaj, ĉar Google decidis aprezi la Esperanto-komunumon, aldoninte Esperanton kiel unu el la lingvoj, laŭ kiuj eblas filtrigi la rezultojn de serĉo.

Atentu, ke ne temas pri la ebleco vidi la retpaĝaron de Google en Esperanto! Tio jam eblas ekde longa tempo kaj de tiaj lingvoj estas pli ol cent.

La nova decido de Google envicigas Esperanton inter nur 43 lingvojn, al kiuj eblas limigi la rezultojn de efektivigata serĉo. Tial la robotoj de Google, nun trairante la reton, aŭtomate rekonas retpaĝojn skribitajn en Esperanto kaj dum serĉado ebligas al la uzanto serĉi sole ene de ili.

Por serĉi per Google nur Esperantlingvajn paĝojn, uzu la adreson: http://www.google.com/webhp?hl=eo&lr=lang_eo

Gravas en la adreso la teksto '&lr=lang_eo' ĉe la fino – tiu limigas la rezultojn al Esperantaj paĝoj. Se vi aldonas ĝin fine de adreso de iu ajn serĉorezulto en Google, tio montros nur tiujn rezultojn, kiuj estas en Esperanto.

Laŭ informoj ŝajnas, ke Google nun kapablas serĉi ene de pli ol 2 680 000 Esperantaj paĝoj. Tio donas bonan bazon ankaŭ por utiligo de Google kiel granda korpuso de Esperanto. (Informis Marek Blahus (E@I) kaj Renato Corsetti.)

'Fajrovulpo' en Esperanto

La populara, libera interretnaviga programo Firefox nun ekzistas en Esperanto. La unuan version de la traduko oni publikigis en septembro 2007. Pliaj informoj haveblas ĉe www.liberafolio.org/2007/fajrovulpo.

Esperanto-feriadoj organizataj de esperantistoj el Vroclavo havas jam kvardekjaran tradicion. Ili okazadis en diversaj mirindaj kuraclokoj de Malsupra Silezio, sed nur ĉi-jare la ĉeforganizanto, Teresa Pomorska decidis surpaŝi spurojn de la kreinto de Esperanto. En Szczawno Zdrój (Ŝĉavno Zdruj) troveblas du ZEO-j. Sur la fasado de klasika pavilono por naturkuracado oni povas vidi nomon de Zamenhof inter tiuj de aliaj famuloj, kiuj banis sin tie en la okzala mineralakvo. En la urba parko multaj promenantoj haltas antaŭ la ŝtonego kun surskribo en la pola kaj Esperanto, rememoranta la kreinton de Esperanto kiel eminentan kuracgaston.

La unua ZEO indikas la jaron '1901', la dua '1902'. Preparante prelegon por la feriantoj, mi konstatis, ke ambaŭ datoj ne estas veraj. Bad Salzbrunn aperas en leteroj de Zamenhof nur dek jarojn pli malfrue, kiam li skribis al generalo Sebert, informante lin pri sia plano veni al tiu kuracloko la 3-an de junio 1912. Zamenhof verkis tie sian unuan leteron, ankaŭ al Sebert, la 10-an de junio: *Kara Generalo. Veninte al Salzbrunn, mi trovis Vian leteron de 5/VI*. Zamenhof ne povis la 3-an de junio trovi leteron, verkitan du tagojn pli malfrue, eĉ se la tiama poŝto funkciis pli bone ol nun. Verŝajne li alvenis la 9-an de junio.

Sian lastan leteron en Salzbrunn Zamenhof datis la 2-an de julio 1912, atentigante, ke li restos tie ĝis la 6-a de julio, sed verŝajne li forveturis unu tagon poste. Eĉ ne sciante ekzaktajn datojn de la alveno kaj forveturo, oni rajtas konstati, ke la Majstro ripozis en Bad Salzbrunn preskaŭ unu monaton; verŝajne pli longe ol kiam ajn en sia tuta vivo. Zamenhof, bedaŭrinde, ne kutimis dissendi al siaj geamikoj bildkartojn eĉ kun

Daŭrigo sur paĝo 10

Bonvenon al Somera Festivalo 2008 en Barlastono!

This year's *Somera Festivalo* takes place from 9 to 15 August. Newcomers might like to know a little about what to expect on site.

Wedgwood Memorial College comprises three houses. They are near each other in Station Road, Barlaston, near Stoke-on-Trent. Each has a pub-type swinging sign showing a picture of the house, easily visible as you approach. *The Limes* is the first set of buildings on your left as you go up the hill after crossing the canal and railway. Drive in, and park in front of *The Limes* building. *Reception* is situated in the little house on the right by the entrance gateway; it will be open from 4 pm on Saturday.

Staff at reception will give you your room key and tell you the code for the front doors, to be used after dark. They will also tell you where you can find coffee and biscuits – usually in *The Limes* common room, just inside the front door and to your right. In the evening, drinks and biscuits are available in the dining-room. This is a 'serve yourself' arrangement, and staff would be grateful if you rinse the cups afterwards. You will find a kettle and tea/coffee-making equipment in your bedroom too.

Your room may be in *The Limes*, or in *Estoril House* just up the hill.

Esperanto House and the *Butler Library* are right next to *Estoril* with space for cars in front and behind. *Esperanto House* will be open during the week for browsing, buying books, etc, and the *Butler Library* will be available for reading and research.



Above: *Estoril*. Top: *Esperanto House*. Right: *The Limes*.

You may like to wander in the gardens, or the arboretum. A copy of the arboretum catalogue in Esperanto is available from *Esperanto House*, or in English/Latin from *Wedgwood College*. Garden seats and arbours abound.

Nia heroo – aŭ La bona samariano

Jen vera rakonto el la pasintjara Somera Festivalo. Ankoraŭ plia ebla titolo por la rakonto estus: 'Venu vi al Somera Festivalo. Oni ne povus antaŭvidi, kio okazos!'

Dum *Somera Festivalo* pasintan aŭguston, studentoj (kaj instruistoj) havis ĉiutage liberajn horojn tuj post tagmanĝo. Tio ebligas kaj digesti la mangaĵon kaj ripozi en la ĝardeno, studi en propra ĉambro aŭ ĉe Biblioteko Butler, sociumi, ludi muzikon, provekzerci skeĉon, ekskursi aŭ promeni, laŭ propra elekto.

Wedgwood Memorial College situas en bela kamparo. Nur kelkcent metrojn for de la



If you have dietary requirements, please let the College know in advance. The evening meal will be at 6.30 pm, in *The Limes* dining-room, and we look forward to our first meal together in what we hope will be an enjoyably stimulating week.

kolegio oni povas atingi monteton, rivereton, laĝeton, rikoltkampojn, arbaron kaj kanalon.

Unu tagon Johano ekiris laŭ la kanalo al vilaĝo Stone. La vetero estis agrable varma. Johano deziris vigle promeni, do li promenis sola.

Apud la kanalo oni rajtas pasi laŭ vojeto, kie dum pasintaj jarcentoj ĉevaloj trenis boatojn. Ĉe la muroj de la pontoj oni povas ankoraŭ vidi sulketojn, ĉizitajn fare de trenŝnuroj en la brikojn. La kanalon apudas miksaĵo de sovaĝaj floroj – akvomento, karekso, salikario, epilobio. Tie kaj tie arboj agrable ombas, kaj en somera sezono maturaj rubusoj tentas al

gustumado. Kantas birdoj, flirtas papilioj, kaj super la akvo flugas libeloj.

Komence, apud Barlastono, situas apud la kanalo domoj, ĉiu kun beleta ĝardeno kun eliro al la kanalpado. Johano proksimiĝis al la lastaj kelkaj domoj, kiam li ekvidis antaŭ si sur la pado senhoman rulseĝon. Li supozis, ke iumomente venos iu tra proksima ĝardenpordo, eble iu tre maljuna kun du promenbastonoj, kaj filo aŭ filino, kiu kondukos lin laŭ la kanalvojetoj. Pro tio li atentis por eviti eblan kolizion. Do estis granda surprizo aŭdi voĉon de alia flanko, el la kanalo.

'Dankon al Dio, ke vi venis! Bonvolu helpi min.'

Johano malsuprenrigardis. Li vidis en la akvo, apud la rulseĝo, mezaĝan virinon, kiu tenis sin al



A family of ducks have been living in the flowerbed by the kitchen of Wedgwood Memorial College. Viv O'Dunne took a picture of them on their way to the canal. Come to this year's Summer Festival and get acquainted with fellow Esperantists and other wildlife.

la kanalbordo. Akvo ĉe kanalrando ne estis profunda, sed la kompatinda virino ne povis elrampi. Eĉ se ŝi sukcesus, ŝi ne povus atingi sian rulseĝon.

'Tales from the Country' – TV at Barlaston

During the course in August 2007 Selena Scott, Tony Francis and a small film crew came to make a TV programme about Esperanto at Barlaston. Not everyone wants to appear on television, so attendees were warned and given the option to stay out of sight. In the event, no one was unhappy about it, but students and teachers had to be flexible to accommodate the crew's filming schedule.

Selena and the technicians were in the breakfast room early. They made jokes about not getting any food if they didn't order in Esperanto – a bit daft, as breakfast is self-serve buffet!

They interviewed Dr Paul Gubbins and Tim Owen, and asked one of our guests from Russia, Lydia Erofejeva, how she came to learn the International Language. The interviews came out well.

Angela Tellier explained the reasoning behind the 'Spring-

board to Languages' project for primary schools.

'Esperanto is completely regular and the grammar is relatively easy so that if children learn this first, they feel that they succeed and they get the idea 'I can do this!' It's like learning the recorder – that helps later, when they come to the study of music.'

The camera whirred in Esperanto House and Butler Library. Selena seemed surprised at the number and type of books available.

'Look at this one – a translation, obviously, of *Reĝo Lear*, tragedio de William Shakespeare. Or how about this? *Vivo de Gandhi*.

Selena sat in on a lesson. Having a camera in the classroom must have been a bit scary for the other students, but of course Selena was quite at home and didn't mind making a fool of herself.

For a programme which one

'Jen – prenu mian manon,' diris nia heroo. 'Baldaŭ vi estos sekura.'

Li tuj savis ŝin, tenante ŝian brakon kaj stabiligante la rulseĝon.

Ĉe tiu loko la kanalbordo eluziĝis, kaj la pado fariĝis mallarĝa. Por trapasi, la sinjorino gvidis sian ĉaron sur malebena grundo. Tial la renversiĝo – la rulseĝo ŝanceliĝis kaj ŝi elfalis.

Nia bona samariaro certigis, ke la elektra rulseĝo ankoraŭ funkcias, kaj ke la virino sekure atingis sian hejmon.

'Vi savis min, dankon, dankon, kara sinjoro. Mi ne scias, kion mi farus, se vi ne venus.' Ŝi certigis al Johano, ke, kvankam malseka, ŝi nun estas en ordo, ke ŝi duŝos sin kaj atendos prizorgantojn, kiuj baldaŭ venos.

Johano ne estas fanfaronulo. Ĉu li eĉ menciis al la sinjorino sian nomon? Li estis kontenta, ke li povis servi, kaj daŭrigis sian promenon. Sendube la sinjorino neniam forgesos lin!

Do venu vi al *Somera Festivalo!* Oni ne povus antaŭvidi, kio okazos. □



ITV filming on the Summer Festival at Wedgwood Memorial College

might assume to have been researched in advance, there were a surprising number of inaccuracies – they even repeated the misleading old saw that Esperanto was designed to *replace* other languages, instead of supplement them. However, the

general tone of the programme was lighthearted and friendly, and a pleasant picture was painted of Wedgwood Memorial College, Esperanto House and the Staffordshire countryside

This edition of 'Tales from the Country' was broadcast on 20 March 2008 in the ITV London region, and in other regions since, including Staffordshire.

You can read the full transcription with notes from the webmaster at www.esperanto-gb.org/eab/eab_news/2008-03-20_tales.htm. □

FILMOJ

There Will Be Blood!

Nun aperas en francaj kinejoj la filmo *There Will Be Blood* (Estos sango – t.e. la 'sango' de la tero = la nafto). Ĝi temas pri la mito de la usona kapitalismo. La inspiron por realigi ĝin trovis la scenaristo, reĝisoro kaj produktisto Paul Thomas Anderson en la romano *Oil!* (*Petrolo!*, 1927) de Upton Sinclair pri afero de koruptado, kiu skuis Usonon en tiu epoko.

Nura rilato inter tio kaj Esperanto estas en tio, ke tiun romanon oni eldonis en 1936 sub la titolo *Petrolo!*, en Esperanto-traduko de William Bailey, ĉe The Esperanto Publishing Co. Ltd en Londono (2 vol. 306 + 320 paĝoj). Upton B. Sinclair (1878–1968), la 'trans-Atlantika Zola', havis fakte simpaton por Esperanto. Ivo Lapenna ĉis pri tio en *La internacia lingvo* (Londono, 1954, p.41) menciita de Isaj Dratwer en *Pri la internacia lingvo dum jarcentoj* (Tel-Avivo, 1977): 'Permesu al mi diri, ke necesaj estas multaj jaroj por ellerni nur legi la anglan, la germanan aŭ la rusan, sed persono havanta nur mezan instruitecon povas kompreni Esperanton post tri aŭ kvar semajnoj.' En alia cirkonstanco,

FILMOJ

li diris: 'Mi faras ĉi tiun antaŭdiron: ke ne estos necesaj tri jarcentoj, sed nur tri jardekoj por ke 99 procentoj de la homoj aŭskultu per la radio Eperanton.'

Tri el liaj romanoj aperis en Esperanto-traduko: *Petrolo!*, *Jimmie Higgins* kaj *La gnomaŭto*.

La antaŭdiro de Sinclair ne efektiviĝis pro aparte tragediaj historiaj cirkonstancoj. La Dua

Mondmilito estis profitodona por Usono ne malpli lingve ol ekonomie. Theodor Roosevelt (1858–1919) malestimis kaj malamegis Sinclair kaj aliajn samtendancajn ĵurnalistojn kaj verkistojn engaĝitajn kontraŭ maljusteco. Li nomis ilin 'muck-rakers' (fekaĵ-esplorantoj).

Henri Masson,
Francio

Why not take an exam?

EAB offers a range of exams that let you test your level of proficiency in Esperanto. You don't have to be taking, or have taken, an EAB correspondence course in order to take an EAB exam; you are welcome to use the exams to complement any course of study. There are three levels – please choose the one most appropriate to your level of learning. All exams can be ordered from the Office (tel. 0845 230 1887). Please note: we only allow one re-take at a given level, so we recommend that you try the appropriate specimen exam first (available from the office or download direct from www.esperantoeducation.com/exams).

EAB member Adrian Pilgrim took the plunge last year:

"I joined BEA as a teenager in the early 1960s and, with only the help of Teach Yourself Esperanto, took the Elementary Examination in 1965 and passed it with flying colours. In the late '70s, however, when I felt I would like to take the advanced level exam, my courage failed me – how on earth could I, as an isolated Esperantist, possibly hope to pass the oral part of the exam, given that my interest in the language was an academic one rather than in attending congresses and becoming fluent?"

About 30 years passed, but in all that time I always cherished the hope that one day the circumstances might be right for me to take the Advanced Examination. Finally, last spring, I decided to attend the EAB Congress in Letchworth and, in a rare fit of self-confident euphoria, contacted the Barlaston office beforehand and applied to take the oral exam during the congress. After all, I thought, if I can somehow get through the oral part (for me the more difficult hurdle), I would have all the time in the world – well, two months, to be exact – to tackle the written part in the comfort and security of my own home. The result is that the EAB Diploma is now proudly hanging on my wall!

To any similarly self-doubting Esperantist I would say: don't hesitate but have a go. First, it isn't nearly as difficult as you might think, and taking that part first which you feel less self-confident about, whether the written or the oral, takes any stress out of the rest of the exam; second, you learn a lot more Esperanto in the process of looking things up (yes, books are allowed for the written part); and third, the end feeling of achievement makes it all so worthwhile. The only question I am left with now is: why did it take me 30 years to do it?"

EAB Exams:

Level One: Elementary – £15.00

Level Two: Intermediate – £17.50

Level Three: Advanced (Diploma) – £20.00 (Written), £10 Oral.

Daŭrigo de sur paĝo 6

banalaj bondeziroj, kiujn ni nuntempe stoke trovas en niaj poŝtkestoj dum feria periodo. Postrestis neniuj detalaj informoj. Tamen ŝajnas, ke li serioze traktis la preskribitan kuracprocedon kaj ne havis tempon por aliaj aferoj.

Eble atestas pri tio mallmultaj leteroj skribitaj de li en Bad Salzbrunn, apenaŭ kvar mallongaj mesaĝoj al generalo Sebert kaj unu al la Loka Kongresa Komitato en Krakovo. Tiu lasta koncernas nur detalojn pri lia alveno al la UK. La kreinto de Esperanto revenis el Salzbrunn hejmen kaj nur la 9-an

de aŭgusto atingis Krakovon por celebri la 25-jaran jubileon de Esperanto. Verŝajne la kuracado bone efikis, ĉar Zamenhof havis sufiĉe da forto por ekskursi al la salminejo en Wieliczka kaj al Tatra Montaro. Li intense partoprenis la riĉegan programon de la jubilea kongreso.

Ĝuste en Krakovo Ludoviko Zamenhof petis, ke oni ne plu nomu lin 'Majstro' kaj eldiris sian faman deklaron: *La nuna kongreso estas la lasta, en kiu vi vidas min antaŭ vi; poste, se mi povos veni al vi, vi ĉiam vidus min nur inter vi.* Tio estis unu el la plej gravaj eventoj en lia vivo. La esperantistoj, kiuj

ĉi-jare ripozis en Szczawno Zdrój, ĝuis ĝian pitoreskan pejzaĝon, ĝian kvietan etoson, promenis laŭ spuroj de Zamenhof, ne povis liberiĝi de la penso, ke ĝuste tie li longe meditis antaŭ ol decidi publike retiriĝi de la gvida funkcio en la movado.

Inter la 18-a kaj 26-a de aŭgusto feris en Szczawno Zdrój 40 esperantistoj el kvar landoj: Britio, Francio, Germanio kaj Pollando. La ĉi-jara Esperanto Feriado, organizita de la Esperanto-Asocio de Malsupra Silezio, entenis iom pli intensan Zamenhofan etoson pro la unikeco de la loko. Tamen ĝi okazis jam la 41-an fojon kaj memkompreneble sekvis sian rutinan programon.

Antaŭtagmezoj estis rezervitaj alterne por terapio kaj Esperanto. Okazis kursoj sur tri niveloj. La progresintojn lingve poluris Teresa Nemere, kiu longan tempon instruas Esperanton en la universitato en Toruń. Pri la komencantoj okupiĝis Grzegorz Pisarski, poligloto el Vroclavo. La subskribinto de tiu ĉi artikolo, helpata de la fama kosma urso 'Mazi', parolis la infanan grupon.

Posttagmeze sub la gvido de Teresa Pomorska okazis ĉiutage ekskursoj en la ĉirkaŭan montaron kaj vizitoj al mirindaĵoj de Malsupra Silezio, inkluzive de la grandega kastelo. Kelkaj personoj vizitis la proksiman kuraĉlokon Duszniki Zdrój, antaŭe Bad Reinerz, kie Ludoviko Zamenhof kuracis sin en la jaroj 1906 kaj 1909. Oni ekskursis ankaŭ al Ĉeĥio. Kelkaj homoj preferis tenison kaj naĝadon.

Ĉiuvespere sonis Esperanto en bela kantado, kiun lerte gvidis Urszula Giercarz kun sia akordiono. Krome Teresa Nemere kompetente prelegis pri popola arto. Grzegorz Pisarski parolis pri spuroj de Zamenhof en Litovio, kaj la subskribinto pri Zamenhof kiel kuracgasto en Bad Salzbrunn kaj Bad Reinerz. Krome mi raportis pri

Osmo Buller esploris pri UK en Kubo

En februaro, atendante aviadilon en la flughaveno de Gatwick por iri al la 5-a Azia Kongreso de Esperanto en Bengaluro, Geoffrey Sutton subite rimarkis konaton preterpaŝantan. 'Saluton, Osmo!' Sekvis surprizo. 'Kion vi faras ĉi tie?'

'Kaj kion vi faras ĉi tie?'

Montriĝis, ke Osmo Buller, la Ĝenerala Direktoro de Universala Esperanto-Asocio (UEA), estis survoje reen al Roterdamo el Havano, kie li partoprenis en la simpozio 'Centjara Jubileo de UEA', organizita de Kuba Esperanto-Asocio (KEA), kaj esploris pri okazigo de estonta Universala Kongreso en Havano en 2010. Jam okazis UK en Havano, nome la 75-a en la jaro 1990.

Buller renkontis funkciulojn de diversaj instancoj, kies sinteno al la reokazigo de UK estas tre entuziasma. Lin akceptis i.a. s-ro Fernand Rojas, Vicministro pri Kulturo, kaj s-ro Conrad Martínez, Prezidanto de la Kuba Kongresa Buroo kaj antaŭe Urbestro de Havano. Krome li renkontis i.a. funkciulojn de la Ministerio pri Turismo, Kuba Libro-instituto, Fremdlingva Eldonejo José Martín, la nacia flugkompanio Cubana kaj Radio Havano.

Dum la vizitoj Buller estis akompanata de estraranoj de Kuba Esperanto-Asocio. Li ankaŭ dufoje kunsidis kun ili en la bela sidejo de la asocio.

Surpriza kaj agraba estis la konatiĝo kun s-ro Abdel Fatta Ezzeldin, Ambasadoro de Egiptio. Montriĝis, ke li flue parolas Esperanton, lerninte ĝin en 1982 en Budapeŝto. La ambasadoro invitis s-ron Buller kun reprezentantoj de KEA al vespermanĝo, kiun ĉeestis ankaŭ la ambasadoroj de Jamajko, Kamboĝo kaj Pollando, honora konsulo de Finnlando, direktoro de la oficejo de Unesko por Karibio, kaj prezidantino k.a. funkciuloj de la Nacia Unesko-Komisiono de Kubo. Dum la vespero la ambasadoro pruviĝis lerta pledanto por Esperanto.

El Gazetaraj Komunikoj de UEA

mia duonjara volontulado en Bona Espero kiel verkanto de libro pri tiu eksterordinara Esperanta eduka institucio por infanoj en Brazilo. Estis montritaj filmoj pri Bona Espero kaj Seviljo.

Notinda estas kontribuo de la urbestro de Szczawno Zdrój, kiu multe helpis la organizantojn, disponigis senpage belan salonon por la inaŭguro de la feriado kaj prezentis tiuokaze interesan paroladon. Akompanis lin prezidanto de Silezia Esperanto-Asocio. Laŭ la kvardekjara tradicio okazis ankaŭ eleganta balo.

El la leteroj de Zamenhof ni scias, ke li loĝis en Villa Waldfrieden. Nuntempe ĝi verŝajne estas la similnoma sanatorio Zacisze. La abunda programo malhelpis ekzakte esplori ĝian identecon. Ne gravas. Jen la tasko por venontjaraj feriantoj.

Roman Dobrzyński

RETE KAJ LETERE

Global communication between ordinary people

Dear editor,

I attended the EAB Congress in Southport. Although I originally joined the Association in 1985 I did not continue my studies as I had so many other activities in my life. I have remained a supporter of Esperanto but was not sure whether it was being promoted as I would have wished. I watched from a distance.

I remember visiting Rotterdam in 1986 and was so impressed with hearing the language used in a working environment. I had similar admiration when attending the sessions on Friday, Saturday and Sunday in May. I also attended three sessions designed to help me as a very inarticulate Esperantist. I was helped by Malcolm Jones, Joyce Bunting and Terry Page who were very patient. Mi dankas ilin.

I have to say that I was appalled at the answers to my



Givanildo Costa ĉe sia laboro por la Esperanto-programo de Radio Rio de Janeiro, Brazilo

• Programaro pri Esperanto de Radio Rio-de-Janeiro oficiale inter la plej aŭskultataj

Bulteno de IBOPE (la brazila tradicia opini-enketa servo) sciigis, ke la programo 'Esperanto, a Lingua da Fraternidade' (Esperanto, la lingvo de frateco) de Radio Rio de Janeiro, vicis en la tria loko inter ĉiuj mezondaj stacioj de la metropola regiono de Rio. La ciferoj rilatas al la trimonato oktobro–decembro 2007. Tio montras, ke ĝin sekvis preskaŭ 13 000 aŭskultantoj.

question as to why Esperanto had not achieved it's aim of becoming the accepted international language. The meeting was told that it might take 200 years to be accepted. Already most people consider it a failed idea and so will be unlikely to consider it in the future. In today's market-economy thinking, if a product is good it will succeed; if it fails then it is a flawed product.

Having spent much of my life studying and being involved in

Oni elektis popolan stilon, laŭ kiu Esperanto estis dinamike, simple kaj junece pritraktita, kun instigo al la partopreno de aŭskultantoj. Granda aŭskultantaro ripetiĝas ankaŭ en la vesperoj de vendredo, kiam oni ree elsendas registritajn programojn. (Informis Fabiano Henrique, Programo Esperanto, a Lingua da Fraternidade, Radio Rio de Janeiro – AM 1400 kHz; www.radioriodejaneiro.am.br. Marde: je la 15h00 (brazila tempo); vendrede: je la 23h00. Ret-adreso: linguadafaternidade@bol.com.br.)

organisations, public and private, I know that there may well be other factors which act against good ideas. The timing might be wrong and/or there may be powerful forces deliberately undermining the idea. I have separately written about how political leadership can betray the most wonderful messages. The ideas of Zamenhof can be accompanied by those of Jesus and Gandhi, and I'm sure there are many others. In the case of

Esperanto the gift of the language to the people was truly wonderful but it was exploited by others wanting to use it to gain power for themselves. The legacy of Zamenhof was not protected by copyright; it can only be protected by Esperantists who are prepared to fight for it.

I would like to be assured that there are Esperantists who will work to make the language a success. To promote the idea of a truly global communication system which operates, not between the elite, but between ordinary people the world over. This *will* require that the political opposition are confronted. Personally, I am convinced that to embrace the idea of Esperanto becoming standard teaching in schools would be the greatest foreign policy action possible.

Brian Haddon



Thanks and suggestion

Dear friends,

This is just a note to say thank you for your help during Adult Learners Week.

A few people, myself included, placed the 'First Lesson' of the Esperanto Introductory Course into our local library, although, at the moment, a poster is not available to accompany the lesson. Perhaps next year?

As a result, however, I've received a suggestion that local libraries should also stock copies of Geoffrey Sutton's new encyclopedia. Detail at <http://www.librejo/enciklopedio/>.

Due to budgetary considerations, your local library may not be able to stock the encyclopedia. However, it should be available to all! The British Library, based at Boston Spa, has a lending library, through which Geoffrey's encyclopedia is certainly available.

Please ask for a copy through your local library [see page 20]. If you have the time!

Brian Barker,
Essex



'Superb, professional helmsmanship'

Dear EAB Trustees,

Following your AGM at Southport, we conducted our own, relatively low-key one. There was a motion tabled to send you all a letter of respect for the way that you've handled business over the last few years, sailing the good ship EAB over choppy waters.

To no surprise, a storm brewed again this year, and was met with superb, professional helmsmanship.

We in JEB would like to congratulate you all on the way that you've conducted yourselves. We feel that you've retained your dignity superbly, coming out of the antagonism very creditably and unblemished.

Congratulations to you all, and we wish you well in your coming ventures,

Tim, Mikeo, Clare, Thomas, and the 'JEB-anoj' on whose behalf we speak.



Kion donis al vi Esperanto?

Karaj geamikoj,

Bonvolu helpi al esperantistoj en la urbo Łódź en Pollando. Tie la loka Esperanto-grupo ĉi-jare festas sian 100-an datrevenon. Okaze de tiu solenaĵo en aŭgusto ni organizas ankaŭ la 31-an Tutpollandan Esperanto-Kongreson. Ni petis redaktorojn de lokaj amaskomunikiloj (gazetoj, ĵurnaloj, radio) skribi pri Esperanto kaj pri la solenaĵo. Nian peton interalie akceptis la dumonata kultura revuo *Kalejdoskop*

Kulturalny (Kultura Kalejdoskop), kies ĉefredaktorino petas pri respondoj al la demando 'Kion donis al mi Esperanto?'

Estos bone, se respondoj venos de diversaj landoj de la mondo. Sufiĉas malgranda teksto de maksimume triono de paĝo. Bonvolu subskribi: nomoj, lando kaj profesio. Se vi povus respondi al mia adreso, ni estus ege kontentaj, kaj via respondo tradukita al la pola aperos en la revuo.

Bonvolu skribi al: Robert Kaminski ĉe la retadreso rk-lodz@poczta.ap.pl aŭ lodzano@neostrada.pl.

Robert Kaminski,
Łódź, Pollando



R L Project, Kosovo

Dear Editor, Dear Esperanto Friends,

It seems you did not receive our letters sent from Kosovo. After the war the post here is not reliable, so now we'll give this letter to be sent from abroad. Also for safety we are giving you another contact address for our project in Mitrovica.

Here we started an independent, free-reference library as a non-profit project and we would be glad to receive here your periodicals, but we have no means to subscribe for it (\$40 is the monthly salary here with 70% unemployment).

In case you'll be able to help us we would be very glad. Our library is set up in the building of a children's home for the disabled and war orphans, and they are looking for donation of used postal stamps, used/new postcards/albums, bookmarks, badges, stickers and other such small items. In case you would be able to encourage any friends to help them, they would be really happy.

Any addresses of others able to help RLP and children wel-

come. We have neither a typewriter nor a PC and no access to the internet.

Ronan A. Dogan
for R L Project
p/a PF 44
CH-4142 Münchenstein 3
Switzerland



Esperanto in court

Dear Editor,

The article in issue 41 of *EAB Update* 'Chance encounters with Esperantists' reminded me of an incident in Pembroke Magistrates' Court, where I worked as Deputy Justices' Clerk until I retired 18 years ago.

On my last day in Court, the Chairman of the Bench referred to the incident, and his remarks were reported in the local press. (*West Wales Guardian*, 16th March 1990). [Editor: One paragraph from the article reads: ... *underneath the deputy clerk's unassuming manner lay a very astute mind, and referred to his literary success. On one occasion within the last two years, said Mr. Davies, Desmond James' knowledge of the international language Esperanto got us out of a very difficult problem.*]

I have often wondered if this is the first reference to Esperanto being used in a Court of Law.

Desmond A.G. James,
Dyfed

Esperanto-Asocio, kun la aŭspicio kaj kunlaboro de UTEPEDI (Surteritoria Triaaĝula Universitato Eksperimenta). La tekstojn ellaboris kaj redaktis la konata Esperanto-verkisto Nicolino Rossi, kaj reviziis profino Maria Luisa Russo. La belaspekta kaj kolore ilustrita libro havas 192 paĝojn en la formato 21 x 13,5 cm. Ĝi estas utilega gvidlibro por la turistoesperantisto, kiu vizitas Napolon. La favora lanĉoprezento estas 12,00 eŭroj plus sendokostoj. Interesitoj bonvolu kontakti Napolan Esperanto-Asociacion, Via Pietro Castellino 115, IT-80131 Napoli, Italio; rete: nicolino.rossi@esperantanapolo.info.

• Filatela Servo restarigita

Helena Esperanto-Asocio anoncis la refondon de la Filatela Servo de Helenaj Esperantistoj kaj de EFI, la Esperanta Filatela Interŝanĝo. La Filatela Servo celas informi ĉiujn filatelistojn-esperantistojn pri helenaj filatelaj aranĝoj, dum EFI celas interŝanĝadon de kovertoj filatele aŭfrankitaj kaj stampitaj. La grekaj esperantistoj invitas ĉiujn Esperanto-parolantajn filatelistojn uzi ilian Filatelan Servon. Respondeca pri la Filatela Servo estas s-ro Aleksandros Fragias, malnova filatelisto, al kiu ĉiu interesito povas skribi poŝte aŭ rete por ĉiaj informoj pri tiu afero. La poŝta adreso estas: Aleksandros Fragias, Figalias 5, GR-145 64 Kifissia, Grekujo; rete: xinithra@otenet.gr. Baldaŭ sekvos informoj pri EFI kaj la 'Gugla'-grupo pri EFI, nun preparataj.

• Somerumi kurse en Aŭstralio

La 24-a Aŭstralia Esperanto-Somerkurso okazos en Sidnejo inter la 11-a kaj 25-a de januaro 2009 ĉe 'International House', kiu estas loĝejo de internaciaj studentoj de Universitato de Sidnejo kaj troviĝas en la urbocentro. Demandojn oni sendu al: aesk@esperanto.org.au. Oni ne provizas perleterpoŝta adreson.

MALLONGE

• 'La plej granda lingva festivalo' kondukas al amasa lernado de Esperanto

La 1-a Lingva Festivalo de Ĉinio montriĝis la plej granda lingva festivalo (el pli ol 50) en la historio. Multege da ĉinoj vizitis la Esperantajn provlecionojn. Estis granda amaso da junuloj en la Esperantaj kursetoj. Ekestiĝis multe da ĵurnalaj artikoloj, radiaj elsendoj kaj almenaŭ kvar televidprogramoj kun favora raporto pri Esperanto. La vorto Esperanto aperis multfoje en la amaskomunikiloj – dekojn da fojoj. Multe da ĉinoj aliĝis al postaj kursetoj de Esperanto – multe el ili nuntempaj instruistoj aŭ doktoriĝintoj ĉe la prestiĝa Universitato de Nankino (Nanjing). Oni aŭdas, ke eble nun la urbo Nankino volas subteni la festivalon. Estas personoj, kiuj ne nur ĉeestis Esperantajn provlecionojn, ili eĉ esprimis sian deziron bone lerni Esperanton kaj poste instrui ĝin. S-ino Cui, kiu estras 100 profesorojn kaj instruistojn ĉe la Universitato de Nankino rapide starigis pro la rezultoj de la

IN SHORT

Lingva Festivalo specialajn kursojn de Esperanto. (Informis Dennis Edward Keefe.)

• Gvidlibro al Napolo

Aperis turisma gvidlibro al la itala urbo Napolo, Napolo kaj ties ĉirkaŭaĵoj (Historio, arto, folkloro), eldonita de Napola



La kovrilo de la nove aperinta gvidlibro Napolo kaj ties ĉirkaŭaĵoj (Historio, arto, folkloro)

humuro de

Elizabetha Rajtmár (Hungario)

Saliko (Finnlando)

Dieter Berndt (Germanio)

Ilustraĵoj: Pavel Rak (Ĉeĥio)

Ŝi konas lin

"De kio vi scias, ke li mensogas?"
"Moviĝas liaj lipoj."

"Pavlo, ĉu vi jam legis la libron, kiun donacis al vi la patrino okaze de via naskiĝtago?"

"Ankoraŭ ne. Ŝi postulas, ke unue mi lavu la manojn".



rekruto: ek-soldato / diabeto: malsano pro manko de insulino

Ĉe rekrutigo

Junulo ne volas soldatiĝi, pro tio ĉe rekrutigo li transdonas al la kuracisto ne sian urinon, sed tiun de sia amikino, kiu havas diabeton. Post unu horo, kiam la analizo estas preta, la kuracisto diras al li:

"Mi havas por vi kaj bonan kaj malbonan sciigojn. La malbona estas, ke vi havas diabeton."

"Kaj kio estas la bona?"

"Vi estas graveda."



Dentisto al sia kliento:

"Via dento mortis. Mi devas fari kronon por ĝi."

"Ne, dankon! Ni enterigu ĝin sen ceremonioj."

• If you would like to subscribe to *Juna Amiko*, send just £10 to the EAB office with your name and address, or order on-line.

Raporto pri multa agado

Post la sukceso de la Internacia Seminario en Germanio – kies ĉeforganizanto estas JEBano Rolf Fantom – la pensoj de JEB revenis al la brita movado.

En Januaro Tim Owen kaj Clare Hunter ĉeestis la 'Ni Festivalu'-semajnfino en Barlastono. Kiel pasintjare ili alvenis malfrue kaj pro tio ne povis partopreni la teatraĵojn. Feliĉe Derek Tatton tamen organizis ankaŭ studsesion por diskuti diversajn aferojn kaj al tiu li ilin invitis. La diskutoj estis tre aŭskultindaj, aparte tiuj, kiuj temis pri artefarita inteligento kaj humanismo, kaj la JEBanoj ege ĝuis lerni per la komentoj de pli spertaj esperantistoj.

JEB-renkontiĝo en Peterborough

En marto okazis oficiala JEB-renkontiĝo en Peterborough. Kelkaj JEBanoj pasigis agrablan posttagmezon en la urbo kaj uzis la tempon por diskuti kelkajn gravajn temojn, ekzemple la retpaĝaron kaj membrecon. Alveninte ĉirkaŭ la dua, kvar el ni iris al loka trinkejo por manĝi kaj kredis, ke ni restos la solaj partoprenantoj. Imagu do nian surprizon, kiam ni subite ricevis mesaĝon de Marteno Minić, kiu hazardo aŭdis pri nia aranĝo dum kunveno de la Londona Esperanto-Klubo, kaj sen scii, kie ĝuste ni troviĝas, veturis al Peterborough por nin serĉi! Li estis tre bonvena aldono al la grupo, kvankam ni unue preskaŭ ne rekonis lin pro lia nova harara aranĝo.

Elkorajn dankojn al ĉiuj patronoj

Marto estis la fino de la financa jaro por JEB, kaj nia kasisto

Mikeo Seaton baldaŭ komencis lerte prepari niajn kontojn. Ĉi tiu estis jaro dum kiu JEB ricevis multajn donacojn de patronoj, kaj ni elkore dankas ĉiujn, kiuj kontribuis. La kasista raporto tamen montras, ke ĉi tiu estis ankaŭ jaro dum kiu JEB havis multajn elspezojn. La plej granda parto de tiuj rilatas al la presado de nia bulteneto *Saluton*. Ĉar nia membraro ne estas tre ampleksa, ni ne povas uzi profesiajn presistojn, kaj ĉiu ekzemplero, kiun ni eldonas do devas esti presita en la hejmo de JEBanoj je alta kosto. Tial, post longa periodo de pripensado kaj diskutado, ni finfine decidis, ke ni ne eldonos pliajn numerojn de la bulteno. Tiu ne estis facila decido por ni. Tamen ni ĝojas povi sciigi vin, ke niaj membroj daŭre verkos artikolojn pri diversaj temoj ĉe nia nova retpaĝaro <http://www.jeb.org.uk>. Tie vi povos legi ankaŭ la pli lastatempajn novaĵojn pri venontaj JEB-aranĝoj kaj renkontiĝoj sur nia blogo.

Kialoj por festi

Dum aprilo kelkaj JEBanoj havis kialojn por festi. Tim Owen ricevis la rezultojn de Esperanta ekzameno, kiun li faris dum la pasinta Internacia Seminario. Kompreneble li bone sukcesis kaj ricevis diplomon, kvankam poste (tute tipe!) li perdis ĝin, pro kio ni simple devas fidi al li, ke ĝi iam ekzistis! Ankaŭ Rolf Fantom ricevis bonan novaĵon. Ŝajne ne kontenta kun ĉefrespondeco pri la Internacia Seminario, li nun fariĝis membro de la organizada teamo por la Internacia Junulara Kongreso 2009 en Liberec. Tiu kongreso okazos ĉe la landlimoj de Ĉeĥio, Germanio kaj Pollando – kaj kun la helpo de brita

organizanto, ĝi certe estos vere internacia evento! Ni certas, ke Rolf uzos sian sperton de la IS por krei tute memorindan feston.

En la pli proksima estonteco, JEBanoj nuntempe pripensas siajn vojaĝplanojn por la IJK 2008, kiu okazos en Szombathely, Hungario. Se estas aliaj gejunuloj, kiuj interesiĝas, bonvolu viziti nin en la forumoj por pli da informoj.

JEB ĉe la Brita Kongreso en Southport

Malgranda grupo de JEBanoj ĉeestis la Britan Kongreson en Southport inter la 9-a kaj 11-a de majo. Por du el ni tiu estis nia unua sperto de Esperanto-kongreso, kaj mi ĝojas povi raporti, ke ni treege ĝuis la semajnfino. Dimanĉon okazis la jarkunveno de JEB, dum kiu ni diskutis niajn ideojn por la estonteco kaj elektis novajn komitatanojn.

La komitato de 2008–09 konsistas el Tim Owen (Prezidanto), Mikeo Seaton (Kasisto), Clare Hunter (Sekretario) kaj Thomas Preece (Komitatano). Aliaj membroj de la komitato de 2007–08 ne kandidatis pro personaj devoj.

2-a Somera Renkontiĝo de JEB – en Buxton

JEB volas publike danki al Daniel White, Petra Fantom, Hannah Tellier kaj Rolf Fantom pro ilia sindediĉo al JEB dum multaj jaroj. La unua tasko de la nova komitato estos organizi la duan Someran Renkontiĝon de JEB, kiu ĉi-jare okazos en Buxton. Ĉu ĉi-somere ni havos pli bonan veteron? Ni rakontos en la sekva JEB-raporto.

Clare Hunter

• Invito labori en Ĉinio

Oni invitas esperantistojn volontule labori en Ĉinio sur financaj kampoj. UIKF (Usona Internacia Kompanio Financ-konsila) ĉefe investas borslistigan koston kaj proponas financ-konsilojn al entreprenoj por laŭregule listigi la entreprenojn en borsojn. Kiel investanto kaj financkonsilanto, UIKF jam sukcese listigis pli ol 30 entreprenojn en borsojn NASDAQ, AMEX, AIM, EURONEXT, OTCBB ktp. La Pekina Reprezent-ejo de UIKF deziras dungi esperantiston volontule labori en Ĉinio por jenaj taskoj: 1. kompili borsan terminaron en Esperanto [jam ekzistas *Internacia komerca-ekonomika vortaro en 11 lingvoj*]; 2. verki kaj revizii financ-analizajn raportojn borslistigajn en la angla lingvo; 3. viziti kaj esplori ĉinajn entreprenojn borslistigotajn; 4. laŭ siaj spertoj kaj kompetentoj proponi al borslistigotaj entreprenoj konsilojn pri juro, financo, ekonomio, kontado, kapitalo, entrepren-administrado ktp.

Kandidatiĝaj kondiĉoj: 1. flue paroli kaj bone kompreni en Esperanto kaj la angla, instrui Esperanton en Ĉinio; 2. havi liberan tempon almenaŭ pli ol

tri-monatan por plentempe labori en Ĉinio; 3. pli aŭ malpli posedi scion kaj sperton pri juro, financo, ekonomio, entreprenado, investado, kapital-administrado, borsa merkato ktp. 4. mem garanti asekuron kaj toleri oftan oficveturadon.

UIKF ofertas al la volontula laboranto: 1. necesajn loĝejon kaj ĉiutagajn elspezojn; 2. vojaĝ-koston en Ĉinio; 3. feriajn tagojn de minimume 8-tagoj dum unu monato; 4. subvencion pli ol 5 000-dolaran por sukcese borslistigi unu entreprenon.

Esperanto estas unu el laboraj lingvoj en Pekina Reprezentejo de UIKF. Bonvolu sendi al ni:

1. la prezenton pri via aĝo, nacio, stud- kaj labor-spertoj, lingvoscio de Esperanto kaj la angla, 2. vian foton, 3. viajn proponojn kaj konsilojn.

Por pliaj informoj, bonvolu kontakti kun s-ro Wang Xigen, la direktoro de UIKF. Tel: ++ 86 139 1171 7001; fakse: ++ 86 10 84094312; rete: Esperanto@ekonomio.net; retpaĝaro: <http://www.ekonomio.net>; adreso: USA International Finance Consulting Group, Apt 8-1-41, Jianguomenwai Diplomatic Compound, No. 1, Xiushuijie, Chaoyang District, Beijing, CN-100600, Ĉinio.

• Nova Esperanta radio el Kaliningrado

Ekfunkciis nova Esperanta radio el Kaliningrado, Rusio, fare de Aleksandr Korjenkov. Vidu ĉe la retpaĝaro: <http://la-ondo.rpod.ru/>. La redaktoro de *EAB-Ĝisdate* volonte publikigus vian opinion, se vi sukcesus aŭskulti ĝin.

• La ĉeĥa urbo Brno sin reklamas nun ankaŭ Esperante – elŝutu kaj reagu!

La oficiala retejo de la urbo Brno – de la magistrato – aperigas inter alilingvaj versioj de informilo pri la urbo ankaŭ du versiojn Esperantlingvajn en la formato PDF. Ni volas konvinki la magistraton, ke valoras eldoni ĝin ankaŭ paperforme, tial ni bezonas kiom eble plej multajn elŝutojn kaj reagojn el la mondo. Vidu en la retpaĝaro <http://www.brno.cz/index.php?nav01=2222&nav02=6391&nav03=6839> aŭ skribu al: Statutární město Brno, Kancelář primátora – Kancelář strategie města, Husova 12, CZ-601 67 Brno, Ĉeĥio. Dankon al ĉiuj elŝutontoj! (Informis Miroslav Malovec.)

• Reklamo en *Le Monde*

En la numero de la 9-a de majo 2008 – la Tago de Eŭropo – aperis en la franca ĵurnalo *Le Monde* informa reklamo pri la lingvopolitiko de la Eŭropa Unio kaj Esperanto. La reklamon pagis Etuo Miyosi (Ecuo Mijoŝi), prezidanto de la japana valiz-kompanio Swany.

• Esperanto-kastelo Grezijono

Por ricevi informojn pri la someraj kursoj en Grezijono, skribu al: bert.schumann@gmail.com aŭ sendu iun ajn mesaĝon al: gresillon-kursoj-subscribe@googlegroups.com. Vidu ankaŭ: <http://gresillon.org>. Por peti paperan version, skribu al: Esperanto-arangoj, Maison Culturelle, Château de Gresillon, FR-49150 Baugé, Francio. Tel. (+33) 241 89 10 34.

EU grant for European Esperanto Union

The European Esperanto Union is to receive a grant from the EU to employ a member of staff and pay for an office in Brussels. The Education, Audiovisual and Culture Executive Agency (EACEA) has decided to pay €55,000 euros (approximately) to cover 80% of the Esperanto organisation's costs.

It is planned that the grant will pay for a European Esperanto Conference due to take place at Grosseto in Italy.

EEU is one of 36 Europe-wide bodies to receive a grant, out of more than 300 organisations which asked for one.

The European Esperanto Union (Eŭropa Esperanto-Unio) brings together the national Esperanto associations of the EU member states and holds congresses every two years. Its member in Britain is, of course, EAB.

MALLONGE

• **May Day demonstration**
EAB member Bill Stewart and a friend demonstrated for Esperanto on May Day. He made a couple of Esperanto flags and walked with them in the big May Day march through Belfast.

• **Vidbendoj en Esperanto**
Listo de vidbendoj troviĝas ĉe <http://movies.groups.yahoo.com/group/per-esperanto-KINO>. Aliaj subtekstigitaj vidbendoj troviĝas ĉe: <http://www.overstream.net/browse.php?browseBy=bestRated&language=18>. Notu, ke en eMule, programo por kunhavi arkivojn, troviĝas diversaj filmoj en Esperanto (sen kopirajto).

• **Firmaoj kiuj uzas Esperanton**
Aperis reta listo de kompanioj, institucioj kaj organizaĵoj, kiuj aŭ oficiale uzas Esperanton kiel laborlingvon aŭ havas inter siaj laborantoj almenaŭ unu homon, kiu scipovas la lingvon kaj pretas

New Members

Mr K. Heggerty, London
Thomas Preece, Nottingham
Mrs E. Rossi, London
Revd Routledge-Wilson,
Nottingham

New Supporter

Mrs S. Kennard, Halesowen

CONGRATULATIONS!

Completed the Free Postal Course

Kaori Nagai, Canterbury
Dennis Pitchforth, Hemel
Hempstead
Bill Stewart, Belfast

Completed the *Elementary...!* Course

Michael Ablett, Danbury

Exam success

Nadine Savarit, France. *Elementary exam* (with Distinction)
Anthony Considine, Oxford.
Diploma (with Distinction)

• Zamenhof en hispana loteribileteto

La portreto kaj la nomo de Zamenhof ornamas venontan loteribileteton de la hispana blindulara organizaĵo.

La Organizo de Hispanaj Blinduloj (konata per la siglo ONCE) laboras por integriĝo de blinduloj en la socio. Granda

parto de la sukceso ŝuldiĝas al ties loterio, tre konata en la tuta lando. Vendata ĉiutage, kaj kun premioj en difinitaj tagoj de la semajno, ĝi montras foje specialajn bildojn kun diversaj motivoj.

La kupono de la 17-a de majo portis la portreton de d-ro Zamenhof, kun la sekva teksto en la hispana: "L. L. Zamenhof, kreinto de Esperanto, pioniro en la kreado de mondo por ĉiuj. 2008, Internacia Jaro de la Lingvoj".

La iniciaton prenis Hispana Esperanto-Federacio okaze de diversaj agadoj por la kunmemoro de la Internacia Jaro de Lingvoj 2008. Pliaj informoj troviĝas en la retpaĝaro www.esperanto.es/projekto08/.



praktike uzi ĝin por intereso de la firmao, kie li/ŝi laboras. En la liston eniris nur tiuj kompanioj, reprezentantoj de kiuj donis pri tio permeson. Se vi dezirus enlistigi vian firmaon, aŭ se vi volas ĝustigi informon pri vi, bonvolu plenigi la formularon ĉe <http://webcenter.ru/~espmik/listo.htm>.

• **Full-page article in *The Sentinel***
A full-page article by John Abberley, entitled 'Global lan-

guage concept nurtured close to home', appeared in the local Stoke-on-Trent newspaper *The Sentinel* on 19 April. This was followed by a letter by EAB member R. Poultney two days later.

• Televida stacio 'Esperanto' en Bjalistoko

La 2-an de majo 2008 ĉe la retejo www.itvc.pl startis nova projekto 'Televido-Esperanto', kies celo



• Herzberg am Harz salutas en Esperanto!

Kvar oficialajn Esperantlingvajn bonvenigŝildojn oni fiksas al la germanaj. Ili estas bone videblaj de ĉiuj, kiuj venas per aŭto al Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo.

estas transdoni informojn por esperantistoj ne nur el Bjalistoko, la naskiĝurbo de la iniciatinto de Esperanto, sed ankaŭ aliloke. Oni elsendos programojn pri esperantistoj, iliaj sukcesoj, kluba agado, kongresoj, renkontiĝoj ktp, kaj prezentos la plej interesajn libroeldonaĵojn, Esperanto-teatrojn, muzikajn ensemblojn, filmojn kaj vizitindajn lokojn. La nova stacio atendas ankaŭ vian personan komenton, kiun vi povas lasi en la retpaĝaro de Televido-Esperanto (vidu supre). Eblas skribi ankaŭ al: Bjalistoka Esperanto-Societo, PL-15-282 Białystok, ul. Piękna 3, skr. pocz. 67, Pollando; retadreso: redakcja@itvc.pl.

• EVA iĝis Literatura

Akademio de Esperanto

Post 25 jaroj de Esperantlingva Verkista Asocio (EVA) ĝia membraro decidis per balotado por nova konstitucio transformi sin en Literaturan Akademion de Esperanto. La nova akademio havos sian unuan jarkunvenon en la UK en Roterdamo.

Remember, your group or federation is always welcome to publish news, notice of meetings and other information in EAB Update.

Nottingham Group now on the web

Nottingham Esperanto Group now has its own website at <http://nottinghamo.wordpress.com>. It is also obtainable through a link from EAB's Membership page. Perhaps this is another idea for your group or federation.

Attend the London Esperanto Club!

The London club meets at the London Irish Centre, 50–52 Camden Square, NW1, most Fridays from 18.00. Information

is available from David Thornell, Flat 7, 80 Gloucester Avenue, NW1 8JD; tel. 020-8752 8147, or see the website at www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/lek.

• Nord-Franca festo



Ĉi-jare 100-jariĝas la Norda Franca Federacio kaj 20-jariĝas la Eŭropa Rendevuo en Morbecque. Por memorfesti tiujn du eventojn, la ĉi-jara Eŭropa Rendevuo en Morbecque okazos dum tri tagoj, de la 7-a ĝis la 9-a de novembro. Por aliĝilo kaj pliaj informoj kontaktu s-inon France Valet, rete: rf.valet@wanadoo.fr.

• 60 ideoj por Eŭropo

Eblas facile reagi subtene al Esperanto kiel komuna lingvo por Eŭropo malsupre de la paĝo: [http://speakup-europe.blogactiv.](http://speakup-europe.blogactiv.eu/2008/03/14/esperanto-as-common-language-for-europe/)

[eu/2008/03/14/esperanto-as-common-language-for-europe/](http://speakup-europe.blogactiv.eu/2008/03/14/esperanto-as-common-language-for-europe/).

• Esperantistoj serĉataj en ĝemelaj urboj

Sébastien Carrez (37 allée des platanes, FR-94700 Maisons-Alfort, Francio; rete: esperanto94@laposte.net; <http://esperanto94.info>) serĉas kontakton kun esperantistoj en urboj ĝemeligitaj kun urboj de sia departemento Val-de-Marne.

La koncernaj urboj estas: Penkrige (kun Ablon sur Seine), Sawbridgeworth (Bry sur Marne), Trowbridge (Charenton le Pont), Littlehampton (Chennevieres sur Marne), Wear Valley District (Ivry sur Seine), Runnymede (Joinville le Pont), Chingford (Saint Mandé), Bognor Regis (Saint Maur des Fosses), Surry Heath (Sucy en Brie), Bishop's Stortford (Villiers sur Marne), Stourport-on-Severn (Villeneuve le Roi), Lambeth (Vincennes), Burnley (Vitry sur Seine), Eastleigh (Villeneuve St. Georges), Falkirk (Creteil), Omagh (L'Hay les Roses). □

Obituary

My Dad **Eric Revill (1921–2008)** learned Esperanto in his teens from his friend John Cresswell's *Teach yourself Esperanto*, bringing up my brother and myself as *denaskaj esperantistoj*. As a BEA and UEA delegate for as many years as I can remember, (with visitors from all over the world staying in our home down the years) he worked tirelessly in the Manchester region and latterly in North Wales – promoting Esperanto, about which he felt passionately; for years and years marking correspondence courses; running the Esperanto *Kristana Diservo* in Cross Street, Manchester, and subsequently at St John's, Conwy, North Wales.

He had been in residential nursing care for the last four years with advanced Alzheimer's and advanced prostate cancer. He died, thankfully peacefully, on 16 June. Reference to Dad's passion for Esperanto was made in the *Manchester Evening News* and *North Wales Weekly* obituaries and at the Commemoration of his life and work at Macclesfield Crematorium.

There may be a few people of his generation who recognise his name, and also some of the younger people he coached might read this and remember.

Mia frato kaj mi dankas vin.

Heather Rowlands and Ian Revill



Festu kun ni jarfine la 25-an Internacian Festivalon en Düsseldorf

Karaj geamikoj,

La pasintjara klerigejo kun simpatio akceptis nian 24-an IF, la nun komplete preta novkonstruo (aŭlo, salonoj, manĝejo, Knajpo) montriĝas ideala seminariejo por nia nunjara jubileo. Ĝia situo apud Rejno, la bela rigardo al la transreja Düsseldorf kaj la apudaj promenvojoj garantias al vi agrablajn jarfinajn tagojn. Nia kleriga programo estas konata pro la abundaj kaj interesaj ofertoj.

La domo disponas pri subtera garaĝo por ĉ. 60 aŭtoj. La enira halo kaj la novaj manĝejoj estas vastastile aranĝitaj, sed la ĉefa manĝejo estas ekipita per diversaj tablo-formoj kaj -koloroj (kelkfoje per pli altaj tabloj, kvazaŭ estus koktelejo), do la tuto aspektas sufiĉe hejmeca. En la unua kaj dua etaĝoj estas la salonoj, ĉiuj moderne ekipitaj kaj kun rigardo al parko kaj Rejno. La aŭlo en la dua etaĝo estas dividebla. Pli ol vortoj, rigardu niajn fotojn en la subpaĝo de nia retejo!

Nia ekskursata celo estos la Triangulo de Germanio, Belgio kaj Nederlando. En Aachen ni vizitos la katedralon kaj la urbodomon, krome ni havos la eblecon viziti specialan bakejon, kiu preparas la 'Akenajn spickukojn'; ili estas konataj kaj ŝatataj ne nur en la regiono, germane: 'Aachener Printe'. Post Akeno ni veturos al la belga urbeto Kelmis, kies regiono iam estis neŭtrala landeto kaj kie franca kaj germana Esperanto-pioniroj klopodis starigi la unuan Esperanto-ŝtaton ... ĝuste antaŭ 100 jaroj, en 1908. La siatempa kunvenejo, kiu nomiĝis 'Amikejo', hodiaŭ estas restoracio kaj pretas oferti nian ekskursan tagmanĝon. Fine ni daŭrigos al nederlanda Maastricht, ĉarma urbo ambaŭflanke de la rivero Mozo, bele restaŭrita kaj famiĝinta pro la EU-traktato.

Mi ĝojus pri via ĉi-jara partopreno en IF. Aliĝu jam nun kaj utiligu niajn favorajn kotizojn, antaŭĝoju pri la nova (kaj plej moderna en Eŭropo) junulara domo kaj pri interesa jubilea programo!

Bonvenon al la 25-a IF – kun la instigo ankaŭ informi viajn geamikojn kaj konatojn, nia jubileo vokas!

Kore salutas vin,

HDP / Hans-Dieter Platz (organizanto)

Rete: HDP@internacia-festivalo.de; www.internacia-festivalo.de



Maldekstre: La enirejo de la kunvenejo – plej moderna junulara gastejo en Eŭropo. Supre: Du bildoj el la pasintjara Internacia Festivalo.



Kunvenĉambro



Ĉiu ĉambro estas moderne ekipita.



En la manĝejo, kaj (sube) vintra pejzaĝo el la kunvenejo al Rejno.



- *Make sure media reference sections and your town, county, university or school library have a copy of this unique work of international reference in English*


Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto

- preface by Dr. Humphrey Tonkin, Professor of the Humanities and President Emeritus at the University of Hartford, Connecticut
- general introduction to Esperanto literature, its history, evolution and modern development
- individual introductions to the five periods of the literature
- over 300 individual articles on the most important writers and their work in chronological order, with biographies and critique
- sample literary texts from some of the best original authors
- an introduction to the language itself, its linguistic structure and creative capabilities, including *Esperanto from the Viewpoint of a Writer* by Claude Piron
- extensive bibliographies and index

Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto 1887-2007 by Geoffrey Sutton. New York, NY: Mondial, 2008. x + 728 pages. Format: 6" x 9" (152 x 229 mm). ISBN 978-1-59569-090-6. Price €66.00 + p.&p.

• **Place your order** online at <www.librejo.com/enciklopedio>, by fax (+1-208-361-2863), or by e-mail: informo@librejo.com. Mondial will respond promptly with information on the various means and prices of carriage. Mondial (Ulrich Becker), 203 West 107th Street, Apt. 6 C, New York, NY 10025, USA.

Resale outlets should contact Mondial (informo@librejo.com) to agree a price. Pay only after agreement on the cost of carriage. Payment may be made by US bank cheque in US\$; or by giro to a bank in Germany; or to Mondial's account at UEA, Netherlands. Also available from EAB at £52.80 + £7.50 p. & p..



Ksenofobia gvidlibro al la **NEDERLANDANOJ**



Verkita de Rodney Bolt.
Elangligis Simon Davies.
Formato: 62 paĝoj, 18 cm.
Eldonis Bero, Roterdamo 2008.

*Kion eksterlandano pensas pri nacio el roz-
vangaj kampanoj, kiuj loĝas en ventmuelejoj
kaj havas lignoŝuojn funde de la vestoŝranko,
tulipojn en la ĝardeno kaj amasojn da rondaj
fromaĝoj en la manĝaĵejo?*

- **Mendu rekte ĉe EAB kontraŭ nur £5.45,** inkluzive de pakado kaj afranko.

EAB, Esperanto House, Station Road,
Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE.
Tel. 0845 230 1887;
rete: eab@esperanto-gb.org